



# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

№ 9

Septembro, 2017

*Karaj niaj Legantoj, jam pasis la somero'2017 kaj nia membraro alpostis siajn multajn impresojn de la multaj vojaĝoj, plejparte, ekster de la Usono. Sed ĉio devas iri strikte laŭ la vico (mi ŝercas). La plej grava evento de la pasinta sezono estas, sendube UK en Koreio, kie loĝas nia vic-prezidinto kaj la avo de 3 genepoj s-ro Puramo Ĉong – unu el la ĉef-organizintoj de la UK en lia gepatra Seulo.*

*Kun granda malĝojo mi informas pri la forpaso de la plej eminenta E-poetino Marjorie Boulton. Sed la vivo, ankaŭ vivo en Esperantujo, daŭras kaj devas daŭri senfine, almenaŭ ĝis la vivo de la plej lasta Esperantisto!*

*Legu la suban tekston. Dankon.*

–Viktoro-Redaktoro

## De Muro al Muro de Les Kordylewski

De la falinta muro en Berlino, kiu dum jaroj dividadis la germanan nacion, ĝis la vivanta muro, kiu nun partigas la korean nacion, vojaĝante per la Transsiberia/Transmongolia trajno ni portis al Koreio la mesaĝon, ke esperanistoj

subtenas la ideon de la unuiĝo de la dividita nacio. Dum la 102a UKo la Korea Parlamento invitis nin por la sesio en kiu ni la 18 kongresanoj el diversaj landoj prezentis siajn opiniojn pri kiel ni vidas la perspektivon de la Korea unuiĝo. Tiun “ponto-kunvenon” salutis la Vic-Prezidanto de la Parlamento kaj malgaje konstatis, ke li jam ne havas ŝancon vidi sian 104-jaran patrinon loĝantan en la Norda Koreio. Dum la kunvenan salonon plenigis multo de la kongresanoj de la 102a UKo, la koreanoj kun ĝojo konstatis, ke la problemoj ŝajne estas nure iliaj propraj kaj per Esperanto ili ricevas la mondan atenton.

Dum la kongresa ekskurso ni havis la okazon vojaĝi al la senmilitigita zono, kaj enrigardi je la alian flankon de la forte gardata limo inter du politike malsamaj Koreioj. Vidante tiujn pikdratajn abatisarojn mi tuj demandis: kiu tiel protektas kiun de kiu? Ne estis facile ricevi la respondon. Mi konstatis, ke la deziro unuiĝi kun la Nordo estas pli emocia kaj nostalgia inter la pli aĝaj koreanoj, dum la juna generacio ne vere deziras tion, vivante kontente en la prospera Sudo.

La kongreso mem estis granda sukceso, kiu pruvis, ke la revo de Nia Majstro ricevadas tute novan perspektivon en la ekstereŭropaj regionoj, pri kio li eĉ ne pensis. Mi



*La kongresanaro malantaŭ la Korea Parlamentejo.*

spertis plenan integriĝon, lingve senprobleman inter la nekoreaj kaj koreaj kongresanoj. La plimulto venis de la aziaj landoj, sed estis ankaŭ la sudamerikanoj. Vidi Esperanton kiel ilian komunan lingvon estis vere ĝojiga.

Dum unu semajno ni loĝis kune, kune aktivis en ĉiuj kampoj de la kongresa vivo. La tradukistojn bezonis nur la neesperantistoj. Krom seriozaj prelegoj kaj diskutoj, ni ĝuis multe da artaj kaj etnaj programoj. Abundis ekskursoj tra la urbo kaj lando, kun esperantistaj gvidantoj. Domaĝe, la varma kaj humida vetero ne favoris kaj rezultis je troa ŝvitado. Sed ja nenio ĝenis la entuziasman etoson de la Kongreso.

La miraklan gefratiĝan rolon de Esperanto mi mem observis dum mia partopreno en la trajna karavano al la Kongreso. Ĝin ankaŭ partoprenis du geedzparoj: unu japana kaj alia korea. Tradicie tiuj nacioj ne rilatas tre bone, do ekde Berlino la paroj okupis apartajn kupeojn. Tamen, en la Moskvo-Irkucka trajno mankis dupersonaj kupeoj, do vole-nevole la du geedzparoj ekokupis la saman malvastan 4-litan kupeon. Post la fino de la multtaga vojaĝo kun uzo de la komuna Esperanto estis evidente ke ili sincere amikiĝis!

Transvortante la eldiron de la mezepoka Francio oni povas diri: “La UK’17 en Seulo forpasi. Vivu la UK’18 en Lisbono!”



# Marjorie Boulton (1924-2017)



La 30-an de aŭgusto, en la aĝo de 93 jaroj, forpasis Marjorie Boulton, unu el la plej ŝatataj Esperantaj verkistoj, honora membro de UEA. La verkista kariero de Marjorie Boulton komenciĝis en 1949, kiam ŝi havis 25 jarojn, per poemaro en la angla lingvo. Post tio ŝi publikigis tridekon da libroj en plej diversaj ĝenroj. Poemoj, prozo, teatraĵoj, literaturaj studoj en la angla kaj en Esperanto aperis el ŝia plumo. La anglalingva publiko tutmonde konas ŝin kiel seriozan literatur-scienciston, la esperantlingva – same tutmonde – ankaŭ kiel poeton kaj grandan amikon de katoj.

En artikolo aperinta en *Libera Folio* en 2005 Baldur Ragnarsson skribas: “Marjorie Boulton estas unu el la plej produktivaj kaj ŝatataj verkistoj en la internacia lingvo. Ŝiajn literaturajn verkojn ecigas subtila arto, sincero kaj humanismo. Kaj per siaj edukaj verkoj ŝi scias instrui per idea riĉo kaj amuzi per ĉiam ĉeesta sprito.”

En omaĝa parolado okaze de transdono de la Esperanto-Kulturpremio de Aalen al d-ro Marjorie Boulton en 1998 Baldur Ragnarsson diris:

*En sia unua poemo en Esperanto, Marborda ŝtono, verkita en 1951, Marjorie, la poetino, tiam 27-jara junulino, priskribas sian iradon sur marbordo en mizera anima stato, kiel okazas ja ne malofte en junaj vivoj. Ŝi hazarde rimarkas ovoforman ŝtonon inter la rokoj kaj ĝin prenas, la ŝtono viviĝas en ŝia mano, kaj pro ia mistera procezo ŝi sentas strangan bruon de “estonta fido”, de “espero nova”. La juna poetino sentas transformiĝon en sia animo, transformiĝon el mizero al fido, precize tian transformiĝon sur tiu stadio en sia vivo, kiam ŝi decidis fordoni sin al arta kreado en la internacia lingvo, Esperanto.*

*Tiu transformiĝo portis en si kreskigan forton kiu rapide produktis abundajn kaj variajn fruktojn: kvar jarojn poste aperis ŝia unua poemaro en Esperanto, Kontralte, ampleksanta malpli ol 273 paĝojn da poemoj, poemoj eksterordinaraj en la Esperanta literaturo, poemoj de virineco en la plej profunda senco, poemoj, kiuj vekus furoran reagon eĉ nun, se tiaj aperus en vaste konata nacia lingvo. Pasis ankoraŭ kvar jaroj, tiam sekvis nova poemaro, simple titolita Eroj, ĉi tiu ampleksanta 349 paĝojn da poemoj, poemoj de plua evoluo de la poezia kreopovo de la poetino, poemoj esplorantaj novajn, pli vastajn temojn sur granda skalo. La fido, kiun simbole vekis la magia marborda ŝtono de juneco, ne estis ia efemera iluzio, ĝi pruviĝis la fakta vero mem.*

En la lastaj jaroj Marjorie Boulton pro sia alta aĝo kaj pro malsano ne ofte povis viziti Esperanto-aranĝojn. En 2015 ŝi tamen ĉeestis la Universalan Kongreson en Lille, mallonge rakontis pri siaj memoroj al la granda publiko, kiu kolektiĝis en la libroservo.

Bulteno “Saluton” multfoje publikigis ŝiajn verkojn sur siaj paĝoj (vd 2014, 7, *Venuso kaj Vulkano*), bultena redaktoro Araneo persone konas la kormemoritan poetinon de la 1997. Li aranĝis tradukon de ŝia verko en la ukrainan. La renoma poetino pasigis sian vivon kiel vera homo (legu la poemon).

Ripozu Ŝi en paco!

–Viktoro (kaj *Libera Folio*)

## Kiel Hirundoj de Marjorie Boulton

La tasko de la cigno estas cigni,  
leoni estas la leona devo;  
la papilio devas bunte signi  
sur heĝoj; ĉiam rajtas ĉiu mevo  
flugi en kurbo hela kaj serena,  
mevi grizblanke en meveco plena.

Sed ni, la homoj, luktas kaj envias;  
ni vivas en suspekto kaj dilem’;  
intrigas, malhonestas, kalumnias  
pro malkapablo esti nur ni mem,  
ĝenas la grandajn pro envi’ sekreta  
aŭ arogantas apud homo eta...

Ni lernu nin akcepti en hejmo;  
en nia karna robo ni nin vestu  
kvazaŭ por festotago; kun la speco  
ni vivu laŭ la tasko; tie nestu  
preter envio, preter korovundoj,  
simple kaj taŭge kiel la hirundoj.

## “Unu Lerneja Leciono pri Esperanto!” de Klaus Friese

Samideano el nia germana ĝemel-klubo en Hamburgo informas, ke en kunlaboro kun Lu Wunsch-Rolshoven de la asocio EsperantoLand kaj Jürgen Wulff de “Esperanto Hamburg” oni eldonis en la jaro 2015 etan broŝuron por instruado en germanaj lernejoj. La angla

titolo estas “A lesson about Esperanto” (ankaŭ haveblas en la franca, germana, turka). La broŝuro estas elŝuteblaj ĉe: <http://esocom.de/klausfriese/eo-stunde/unuhoro.html> (vd alkroĉaĵon).

Renato Corsetti subtenas la agadon kaj lancis peticion ĉe ALVAZ.org en

la angla lingvo “to be delivered to all the ministries of education in the world and to all teachers in all countries of the world”. En Hamburgo mi vizitis pli ol 100 lernejojn kaj tie transdonis la broŝuron. Nun mi esperas, ke la projekto estas ankaŭ subtenata de la ESdeS.

### Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Randy Ream  
1835 N. Natoma Ave., Chicago, IL 60707  
773-262-7738  
[www.esperanto-chicago.org](http://www.esperanto-chicago.org)

### Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski  
Vicprezidanto – Randy Ream  
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk  
Sekretario – Tina Seastrom  
Kasisto – Karlo Gunn  
Membro – Hans Becklin

### MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;  
Familia membro: \$30,  
Regula: \$20  
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website. Gifts are welcome also.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

### SEKVANTAJ KUNSIDOJ

Venonta kunsido okazos 7:00-9:00pt laŭ en la Centra Biblioteko sur la 6-a (sesa) etaĝo norda stud-ĉambro: 400 S. State St., Ŝikago.

**26-an de Septembro** – Someraj impresoj (kune kun suneklipso)

**24-an de Oktobro** – La temo estos anoncata

**28-an de Novembro** – La temo estos anoncata

**17-an de Decembro** – Zamenhofa Tago – La loko estos anoncata